

La libro La fenomeno Svislando de Arthur Baur

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI-823/292, 1979 julio 19 kaj 21

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-1979-44/SRI-1979-44-A-1-292-823-1979-07-19-21-Claude-kaj-Andree-Gacond-La-libro-La-fenomeno-Svislando-de-Arthur-Baur.mp3>

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée GACOND.

Ĉiu Universala Kongreso okazinta en Svislando lasis spuron sub formo de libro-eldono aŭ de nasko de nova organismo. Se la tri unuajn kongresojn de 1906, 1913 kaj 1925 antaŭ ĉio markis la personeco de Edmond Privat, la tri postajn markis tiu de Arthur Baur. Okaze de la Berna kongreso en 1939 aperis lia rimarkinde interesa Svisa Antologio. En la samurba kongreso de 1947 ekfunkciis dank' al lia redaktora talento la esperanto-elsendoj de la kurtonda servo de la svisa radio kaj ĉijare, okaze de la Lucerna kongreso aperas nova lia verko: La Fenomeno Svislando.

A.- Ĉiuj kongresanoj alvenante en Lucerno ricevos tiun ĉi preskaŭ centkvindekpaĝan libron bele ilustritan. Ni ne scias, ĉu dum la aktivecplena semajno de la kongreso, ili havos la tempon detale legi tiun ĉi tre bone faritan raporton pri la historio, politiko, ekonomio, kulturo kaj ĝenerala vivo en nia kvarlingva federacia landeto. Ideale estus, se la kongresanoj estus ricevintaj la libron, kiel enkondukon al la farota vojaĝo. Sed tamen sur la revenvojo kaj hejme ĉiuj kongresanoj helpe de tiu ĉi belaspekta libro povos pliintimiĝi kun la vizitita lando, malkovrante ties originalaĵojn.

Cl.- La libro La Fenomeno Svislando ĉe la legado donas la impreson sin prezenti, kiel vico da artikoloj gazetaj, aŭ da prelegetoj. Jen trajto, kiu spegulas la aktivecojn de la aŭtoro, kiu estas ĉefredaktoro de la Winterthura taggazeto "Landbote" kaj nia kronikista kolego ĉe Svisa Radio Internacia. Tiu ĉi karaktero de artikolvico faciligas la legadon de la libro. Bedaŭrinde por nekonantoj de la svisa geografio la ĉefa manko, kiu tuj sentiĝas, estas tiu de mapo, des pli, ke Arthur Baur ofte citas kanton-, urb- aŭ river-nomojn en esperantigita formo. La nacilingvaj mapoj ne ĉiam trovigos la solvon.

A.- Rilate al la geografia nomenklaturado regas nenia lingva principo. Ekzemple je la. paĝo 25-a en la listo de la sep katolikaj kantoj formintaj apartan ligon, du el ili aperas esperantigitaj: Lucerno kaj Valezo, kvar en la germana formo: Zug, Schwyz, Uri kaj Unterwalden, kaj unu en la franca formo: Fribourg. Persone ni estus preferintaj iom pli konsekvenca sistemon, ekzemple la nuran uzon de la nacilingvaj formoj aŭ regulan esperantigon kun aldona indekso.

Cl.- La atentaj legantoj verŝajne povos fari aliajn lingvajn kritikojn, interalie la nenorman uzon de kelkaj verboj, kiel evolui, kiu fariĝas ĉe Arthur Baur evoluiĝi, kaj la senprincipan uzon de la artikolo la, kiu estas sufiĉe ŝoka. Sed ni pardonu tiujn fuŝetojn en verko tutcerte rapide verkita, kiu havis precizan celon: prezenti la hodiaŭan Svislandon al la partoprenantoj de la 64-a UK.

A.- La historia parto ne nur raportas pri la formiĝo kaj kresko de la svisa konfederacio, pri la ekesto de la nunaj institucioj, sed ankaŭ pri ĉijara evento: la naskiĝo de la kanto Juraso. Ne estas facile en 20 paĝoj raporti pri preskaŭ mil-jara periodo. Arthur Baur lerte elektis la plej karakterizajn eventojn, kiujn li priskribas evitante ĉian pedantismon.

Cl.- La samon ni povas diri por ĉiuj partoj de la libro. Tutcerte tiu pri politiko permesos al multaj legantoj malkovri, kiaj realaĵoj sin kaŝas malantaŭ la konceptoj komunumo, kantono, federacio. En la ĉapitro titolita la popolo kiel plej alta instanco, Arthur Baur komprenigas, ke se en absolutaj monarkioj oni nomas la monarkon la suvereno, en Svislando la popolo portas tiun titolon. En svisaj gazetoj oni povas legi en la tago post voĉdono ekzemple: "la suvereno estis malbonhumora". Kaj tio signifas, ke la popolo malakceptis la proponon, kiu estis submetita al por aprobo aŭ malaprobo.

A.- Arthur Baur alportas tre precizajn klarigojn pri la manieroj konsulti la suverenen en rekta demokratio, li provas eĉ intimigi la legantojn kun la diverseco de la partioj, kies nomoj kaj tendencoj malsimilas de kantono al kantono, la veraj ŝtatoj en la svisa federacio.

Cl.- La parto dediĉita al Svislando inter la nacioj montras, kiel naskiĝis la svisa koncepto de la daŭra kaj neŝanceligebla neŭtraleco. Li respondas al demandoj, kiujn ofte faras fremduloj kaj klarigas, kial Svislando ĝis nun ne povis aliĝi al Unuiĝintaj Nacioj, dum ĝi siatempe estis membro de Ligo de Nacioj.

A.- La parto dediĉita al ekonomio montras, ke en malriĉa lando kiel Svislando la ĉefa riĉeco estas la laboro, kaj kiel la tekstila produktado kondukis la landon al vigla industriigo, Ni notu kuriozan miskomprenon pri la tekstila originalaĵo de la kantono Neuchatel, kie la presitajn kotonajn oni nomis "indiennes". Arthur Baur kredas, ke tiujn kotonajn oni nomis "hindaj" ĉar Hindujo estis unu el la ĉefaj importantoj de tiuj buntaj ŝtofoj". En la realeco temas pri presmaniero inventita de la hindoj, kiun vojaĝintoj alportis en Eŭropon. El tio la nomo "hindaj" kotonaj aŭ "indiennes".

Cl.- La kultura parto, kiu raportas pri la lingva diverseco, la rolo de la germana, la stato de la franca, la fazoj de la itala, la minacata retoromanĉa, la kvarlingva literaturo, la verkistoj alemanaj, romandaj, itallingaj kaj retoromanĉaj, la kinematografio, la arkitekturo kaj pentrado, la komponistoj kaj fine pri la popola muziko, estas nepre legindaĵo por ĉiuj vizitantoj de Svislando. Ni eĉ konsilus unue legi tiun ĉi parton, kiu helpas pli bone kompreni la aliajn pri politiko kaj ekonomio kaj pri la aktualaj problemoj, ĉar ĝi bonege priskribas, kio estas la vera diverseco kaj samtempe originaleco de la svisa popolo.

A.- Fine ni menciuj, ke post parto dediĉita al la aktualaj problemoj, kiujn alfrontas la svisoj, Arthur Baur en lasta parto raportas pri la esperanto-vivo en Svislando.

Cl.- La enkonduko diras pri La fenomeno Svislando, ke "ĉi tiu libro estas nek geografia lernilo, nek turisma varbilo, nek nacia propagandilo, nek kolekto de statistikaj ciferoj, sed" ke "ĝi volas prezenti Svislandon tia, kia ĝi estas kaj vivas." Ni opinias, ke Arthur Baur sukcesis en sia entrepreno, kaj ni nur povas kuraĝigi niajn radio-geaŭdantojn legi lian libron.

A.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!